Jaro III/VIII. N-o 12 (36) Septembro 1926



Monata Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda
FONDITA EN 1919

Literaturo - Scienco - Pedagogio

ENHAVO :

Labormarkoj. Trad. Erich Haseloff. — *Av. Isahakjan* : Abu-Lala-Mahari. Trad. G. Sevak. — *Ŝolem-Alejĥem* : Tri kapetoj. Trad. Ŝio Traŭbe. — *Jean Jaurès* : La minkarbo kaj la tritiko. Trad. E. Lanty. — Pri energio. Kompilis G. Demidjuk. — *Mark Starr* : Edukada skemo de la Brita Laborist-Sindikataro (T. U. C.). Fondo de Laborist-Universitato.

Redakcio : 1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5. Moskvo, I (USSR)
Administracio: Rich. Lerchner, Colmstr. 1. Leipzig O 27 (Germ.)

REDAKCIA ANGULO

Finita la jaro... Per tiu ĉi n-ro finiĝas la III-a jaro de «Senn. Revuo»... Kaj oni jam povas fari konkludon al la farita laboro.

Sufiĉas nur trarigardi la tabelon de l'enhavo de la tutjara kolekto — por vidi ĉion, kio prosperis esti farita. La tabelo de l'enhavo mute parolas pri multo. Ĝi klare demontras la variecon de nia revuo, ĉiujn ĝiajn bonaĵojn kaj... mankojn.

Kio mankis al ni dum tiu ĉi jaro? Jen tiun ĉi respondon donu al ni la legantaro de «S. R.», post kiam ĝi atente trastudos la tabelon. Por ni gravas tiuj ĉi eventualaj respondoj, ĉar ili montros al ni la vojon por la jaro sekvanta.

Niaflanke ni nun provas resumi la jarrezulton laŭ nia kutima maniero — per statitistikaj ciferoj. La ciferoj ofte parolas tre elokvente kaj senpasie, senkompate malkovras multajn malklaraĵojn. Precipe se ni faras komparon kun la jaroj antaŭaj.

Jen estas la statistiko de nia trijara laboro:

	1923/24	1924/25	1925/26
Suma kvanto da eldonitaj paĝoj . .	224	248	240
Kvanto da presitaj verkoj	82	109	89
El ili °/₀ da esp. originalaĵoj . . .	39	46	40
El kiom da lingvoj estis presitaj tradukaĵoj. . . . . . , . .	13	15	16

Kiel estis dispartigita la enhavo de «Senn. Revuo»:

°/₀ da belarta prozo.	50	33	36
°/₀ da poezio	25	25	26
°/₀ da literaturaj skizoj.	8	8	5
°/₀ da sciencaj, teknikaj kaj aliaj artikoloj	17	20	24
°/₀ da pedagogiaj artikoloj	—	14	9

(Daŭrigon vidu sur 3-a paĝo de la kovrilo.)

 LITERATURO 

LABORMARKOJ

EL MIA NOV-JORKA TAGLIBRO

Jam vespere mi venis al mia laborejo du minutojn pli malfrue. La pordo jam estis fermita. Nun mi sciis, ke mi subite fariĝis senlabora. Anstataŭ mi nun laboris iu el tiuj, kiuj ĉiam estis atendanta antaŭ la pordo, ĝis iu forrestis aŭ malfruiĝis iomete. Ĉar oni ĉiutage estis ricevanta sian monon perlaboritan, oni ĉiuhore povis esti eksigata. Kaj se la mastro estis kaprica, li maldungis nin eĉ sen ia kulpo. Oni ne plu estis enlasata kaj restis senhelpe sur strato....

Mi direktis min tra *Brooklyn Bridge* al *Chatham Square*. Tiam mi flankiĝis maldekstren, al la *Battery*. Tie mi sidiĝis sur benkon kaj atendis la venontan matenon....

Mi estis malsata... malsatega. En la bakejo (ĝis tio mi laboris en bakejo) oni ĉiam povis ŝteli iom kaj tial oni preferis aĉeti tabakon. Mi nun maĉis tabakon kaj ekdormis. Subite mi estis puŝita per ia bastono kaj policista voĉo aŭdiĝis:

— Ne dormu tie ĉi !...

Kaj li iris pluen....

Mi fikse rigardis la proksiman golfeton. La blanka punkteto malproksime ne estis stelo... Ĝi estis la torĉo de la statuo de Libero. Ĝi trembrilis... kiel malproksima stelo.

Matene je la kvara mi staris antaŭ la malnova *Barge Office*. Tie estis oficejo por senlaboruloj. Pli ol mil viroj tie jam staris; kaj kiam la halo je la kvina estis malfermita, ĉeestis kvar mil. Ni grincis per la dentoj pro malvarmo. La halo estis preskaŭ tute malhela. Nur antaŭe estis iom da lumo. Tie du oficistoj sidis, legante ĵurnalon... Ni estis kunpremantaj nin, varmigante nin per tio. Kelkaj flustris. La plimulto silentis. Miaj genuoj tremis pro lacego. Je diablo, kio okazos, se mi ricevos laboron... kiel mi povos elteni dek-du horojn ? Malantaŭ mi ekĝemis maljunulo. Li falis kaj kuŝis kiel mortinto. Du junuloj alvenis kun portiloj kaj forportis lin. Li nun fartos pli bone. Almenaŭ li nun ricevos varman manĝaĵaĉon. Se li estis malsana, li nun estos feliĉa, ĉar oni lin portos en hospitalon, kaj li havos loĝejon... ĝis kiam li ree estos transdonita al la terura sorto....

... Palflava matenlumo enpenetras tra la fenestroj. Nun ni povis vidi, kiaj fantom-statuoj ni estis. Ĉie oni tusis kaj ĉien oni kraĉis... Mia stomako ankaŭ ree anoncis sin. Mi ekmaĉis tabakon kaj englutis la sukon... ĉagrenigante la stomakon... Fine sonoris la telefono kaj iu voĉo bruis la postulon: «Dudek masonistoj al *Jersey City*». Oni ne donis ian ateston. Tio daŭris tro longe... Nun la sonorilo de la telefono aŭdiĝis ĉiujn kvin minutojn. Multe da laboristoj estas en Nov-Jorko... multege. Sed... la nombro de senlaboruloj estas ankaŭ konsiderinda, tio estas — la nombro de senlaboruloj estas pli granda ol la laboro proponata. Mi ne tuj forkuris — mi faris ruzaĵon... Mi atendis. La atendado estis kompensata. ĉar mi ekaŭdis tion, kio al mi ŝajnis konvena....

Carlton, Brooklyn serĉas 200 laboristojn sub kvardek (tio signifas pli junaj, ol kvardekjaraj)... Kun la unuaj mi forrapidegis. Kiel sovaĝaj ĉevaloj ni rapidis tra la stratoj, ĝis mi atingis tramon; tie mi devis stari sur la piedbreto, tenante min per la maldekstra mano, ĉar per la alia mi serĉis la lastan moneron por pagi la veturkoston. Post duona horo — ankoraŭ dekminutan konkur-kurado laŭlonge sur senfina strato, borderita ambaŭflanke per nigraj muroj.

Antaŭ alta fera pordego mi haltis. Almenaŭ mil viroj tie estis kunigintaj sin, formante kvazaŭ vivantan amason. Ĉiuj atendis... atendegis... De malantaŭ la pordego estis aŭdebla ega tondrado, kriaĉado, krakado, martelado. El la kamentuboj densa fumego elpenetris. Krieganta infero ŝajnis esti kaŝita malantaŭ la muro...

Ho..., se ni nur povus iri en ĉi tiun inferon... Ni fikse rigardis ĉi ŝtalan pordegon kaj miloj da varmegaj pensoj ekfrapis kontraŭ ĝi. Junulo kun larmoj en la okuloj staris apud ni kaj, kiam ŝlosiloj brukrakis, li raŭke ĝemis: ... Jesus... Jesus...

Sed la ŝtala pordego ne estis malfermata. En ĝi ankoraŭ troviĝis mallarĝa pordeto, kiu estis malfermata. Eksteren venis la mastro, efektiva grandegulo. Lia ruĝa vizaĝo rigardis la mizeron, starantan antaŭ li, kaj raŭka ridaĉo estis aŭdebla...

Subite puŝado, premado ekiĝis, ĉar ĉiu volis esti proksime de li. La mastro ridis kaj kontraŭstraris:

— Ho... Ho... malrapidu — kiom da vi estas? Ni bezonas nur ducent...»

Neniu respondis. Ĉiu sin ŝovis antaŭen, kun rigidaj okuloj... Dolor-ekkrio: tie iu estis premita al la akra mura rando. La mastro rikanis super ĉiujn. Li ŝajnis al mi kvazaŭ diablaĉo, kiu nin mokis, nin — kiuj volis vendi al li la solan kion ni posedis... niajn fortojn... kiuj ne plu valoris multon.

Subite li ekkriis:

— Atentu fihomoj... Atentu bone!... Ĉi tie mi havas kelkajn labormarkojn... Kiu alportos unu el ili, tiu ricevos laboron. La aliaj iru al diablo!

Nun li ĵetis kelkajn labormarkojn aeren. Ili falis sur niajn kapojn, vizaĝojn, ruliĝis teren... Dum sekundo estis morta silento. Tiam okazis teruraĵo. La amaso ekbruegis barbare, brute. Simile bruegas bestoj en zoologiaj ĝardenoj, kiam al ili estas ĵetata manĝaĵo... Kaj tiam komenciĝis la batalo — kruela furiozado, similan al kiu mi neniam vidis inter homoj.

Krianta rondaĵo turniĝis teren. Insultego, spirego, ĝemado. Ni rampis en koto kaj serĉis la markojn, falintajn teren. Pezaj botoj premis niajn manojn. La homoj sin atakis kiel sovaĝaj bestoj. Kalaj pugnoj batis, bategis la dorsojn de l'kunuloj. Mi vidis malpuriĝintan grandegulon, kiu akiris la ladan markon kaj tenis ĝin super la kapo. En la alia mano li tenis feran bastonon. Per ĝi li batis ĉirkaŭ si, kiel frenezulo. Kelkaj trafitoj ruliĝis, sangante, sur la teron. Oni ĵetis la grandegulon surteren kaj provis forpreni de li la kaptaĵon. Dekstre kaj maldekstre ekrifuĝis kelkaj, aliaj rapidis post ili.

Batalo je vivo kaj morto estiĝis pro la malbenindaj ladaj markoj...! Oni volis vivi... diablo... vivi... vivi. Kaj tial oni batis ĉirkaŭ si... defendis sin... eĉ oferis la ortojn... nur por ricevi... laboron... Subite ekpafis... ekpafegis. Multaj pafiloj forsendis la mortigantajn kuglojn... Faifsonoj aŭdiĝis... Klano vestita per uniformo alrapidis kaj ekbatis per gumaj bastonoj je la dorsoj de la bedaŭrinduloj interbatalantaj... Tio estis la ŝtato, kiu zorgis pri ordo.

Mi forkuris kune kun cent aliaj... venkitoj... forpelitoj... Mi ne plu povis pensi ion. Sed pli bone estas almozpeti, ol tion ripeti...

Tagmeze iu donacis al mi 25 cendojn. Krom tio li donis al mi paperaĵon, sur kiu estis skribite:

Amu vian proksimulon.

Ĉu oni povas ami la homojn priskribitajn?

El « Deutscher Verkehrsbund » tradukis

ERICH HASELOFF (5827).



ABU - LALA - MAHARI

Av. ISAHAKJAN

Kvina Surah'o

Kaj sub varma suno de l' tagmez' dezerta plaĉe bonodoris la narcis'-zatar' 1)
Kaj la karavano per polvaĵ' kovrita marŝis malrapide en ŝvitiga laĉ'.
— « Iru, karavano, tra varmegaj ventoj kaj tra uragano al dezert' kun mi! » —
Tiel kunparolis en kolera koro la poeto granda Abu Mahari!
— « Min do ekataku ventoj rostigantaj kaj postsignon mian blovu for de l' ter',
Por ke l' hom' neniam povu min atingi kaj kun mi samloke spiri el aer'.
Tie ja libera estos mi de l' homoj, — kiun do krom ili devas timi mi?
Do kun blek' sovaĝa tigroj kaj leonoj faru kuron sangan rekte kontraŭ min.
Jen sur sablamaso, vidas mi, ekstaras kun blondflavaj haroj da leonoj
[grup' !
Kaj de l' kolhararoj oraj de la bestoj fulmojn elvenigas la bruvent-uzurp' !
Venu, mi ripetas, vin mi ne forkuros, venu manĝi koron mian en dolor' ;
Ne reiros iam mi al ajna homo kaj ne frapos pordon de l' malica hom'.
Inter homoj oni devas esti ĉiam sobra kaj atenta, glavon en la man' —
Por ne trafi kiel ĉasa kapt' la gorĝon de la malamiko kun amika fam'.
Kio estas homoj ? — Maskohavdemonoj kun tranĉegaj dentoj, kun ungegoj eĉ,
Ili havas hufojn, ili estas bestoj ; lango homa estas glavo kun venen'.
Homoj ? — Ili pretas trinki vian ŝviton kaj envias vian panon kun maliĉ',
Ĝojas vian falon, falsaj denunculoj, lupoj, hombuĉistoj ĉiam sen sufiĉ' ! —
En malriĉ-mizero — tro malgrandanimaj, humilegaj, flataj, pretaj al sin-
[vend';
En riĉec' — senkoraj, tro sin imagantaj, fanfaron-sendankaj, pretaj al
[revenĝ' !
Unu post alia mi kalkulas paŝojn, la sennombrajn paŝojn de la kamelar'.
Tamen ne atingas ili la mezuron de la krimoj, kiujn faras hom' en tag'.
Jen mi alparolas al la oriento, al la nord', la sudo, al la okcident',
Kies ventoj, spitaj unu la alian, aŭdas nun la vortojn miajn en dezert' :
Aŭdu kaj disportu ĉi fajregan diron, ke la mond' eksciu de la mar' ĝis mar',
Ke pli malŝatinda, pli malbonanima ol la hom' ne povas esti en bestar' !
Amas mi, mi amas vulpon kaj ŝakalon, tamen ami homon mi ne povas jam.
Kiu min turmentis kiel hom' senkore, kiu tiom sangon trinkis krom la hom' ?!
En la mond' la bonaj mortas kaj pereas pro l' malbonaj, kiuj en sufer'
[sen fin'

---

1) *Floro dezerta.* — G. S.

Tenas la bonulojn, kaj kreskadas lolo tute en libero sur la kamp' de l' viv,
Mondo maldankema, kie per la oro la ŝtelisto iĝas sankta kaj bonul',
La stultul' — genio, la timul' — heroo kaj malĉasta ino — virga sen makul'.
Mondo homa, kie antaŭ forta ĉiam la malforta estas kulpa sen parol',
Kion ajn nur faras aĉa hom' en mondo tute abomena — ĉiam por la aĵ'.
Nur por aĵo homoj ĉiam estas sklavoj kaj adoras manon ruĝan pro la sang'.
Jen la homo — ĉiam bildo de la dio, tamen en vereco — bubo de Ŝejtan' 2)
Dum la astroj ĉarmaj brilas sur ĉielo kaj okulparolas kun silenta step',—
Dum serpentumante buloj da sablaroj fajfas kaj blekadas, kiel la serpent' —
Mi ne plu deziros homojn alsaluti, mi ne plu reiros al la homkomun',
Se eĉ min ŝakaloj mordos en pecetojn kaj la flamaj ventoj kaptos min, eĉ nun!
Kuru, karavano, for de l' diboĉadoj pro volupta ĝuo, pro malpur-malĉast',
De la fiarenoj de mensog' kaj falso, de la fibazaroj de la homvendad'!
Kuru for de l' ino, amo kaj komuno, de l' justeco same, kiel de la venĝ',
Kuru for de l' frato, kamarad', patrujo, kuru for de l' homa ombro, sen [ekhalt'!
Iru, karavano, premu sub la hufojn kaj frakasu homajn leĝojn dum la kur',
Kaj per polv' survoje kovru la potencon, bonon kaj malbonon, kovru ĉion tuj!»

Kun la kurbaj koloj, kiel la pafarkoj prete ekstreĉitaj, kuris en rapid'
La kameloj lacaj kaj post si restigis polvan karavanon. longan ĝis nevid'.
Tra la sunrostitaj kampoj la kameloj kuris rapidege al senkona for'
Kaj per polvaj nuboj kovris la senlimajn urbojn kaj kamparojn sur la tera voj'.

Kvazaŭ pro ektimo kuris rapidege, sen ekhalt-ripozo, Abu Mahari',
Kvazaŭ homaj leĝoj, ino kaj komuno paŝ' post paŝ senĉese persekutis lin.
Kaj la karavano tang-ting-tang-ting'ante, nererigardante marŝis sen reven'
Preter altaj turoj de grandegaj urboj, plenaj per alarmo pro pasi' kaj pan'.
Kuris ĝi rapide tra vilaĝoj, longe en stultec' dronantaj dum jarcenta daŭr'.
Kuris ĝi senhalte rekte al dezerto kun sopir' senlima pri l' ruĝbrila astr'.
Kaj serpentumante, per zigzaga iro, kun koler' en koro marŝis l' karavan'.
Kun sulkega frunto meditadis peze Abu Mahario kun anima flam!
Ploris li senlarme, ploris la poeto kaj doloro lia peza kaj sen fin',
Kiel ankaŭ vojo lia volviranta daŭris longe, morton ja ne havis ĝi.
Kaj li ne rigardis reen al la vojo, ne domaĝis kion postrestigis li,
Nek salutojn donis, nek salutrespondis al la karavanoj renkontantaj lin...

(Daŭrigota).



---

2) *Ŝejtan — Satano.* — G. S.

TRI KAPETOJ

ŜOLEM-ALEJĤEM (1)

I.

Se plumo de verkisto estus peniko de pentristo, aŭ almenaŭ aparato de fotografisto, mi alportus al vi, amiko, donace je honoro de Pentekosto bildon de malofta grupo de tri junaj, belaj, ĉarmaj kapetoj de tri malriĉaj, korpe kaj piede nudaj judaj infanoj. Ĉiuj tri kapetoj estas nigraj, la haretoj krispaj, la okuletoj — grandaj, brilaj, brulantaj, rigardas vin kvazaŭ mirigite kaj demandas la mondon: Kion do? Vi rigardas ilin kaj miras kaj sentas vin antaŭ ili kvazaŭ pekinta, kvazaŭ vi tute estus kulpa pri tio, ke oni kreis ilin — ankoraŭ tri superfluajn estaĵojn en la mondo oni kreis!...

Tri belaj kapetoj — Abramĉjo, Mojsajĉjo kaj Dvornjo — estas du fratoj kun malgranda fratineto. Abramĉjo kaj Mojsajĉjo — tiel la patro Pejsi la bindisto ŝanĝis iliajn nomojn laŭ la rusa maniero. Se li ne hontus sian edzinon Peson kaj ne estus tiel treega malriĉulo, li al si mem ankaŭ refarus la nomon el «Pejsi la bindisto» je «Peti Pereplotĉik». Sed li iom timas sian edzinon Peson kaj ĉar li estas, Dio nin gardu, granda senmonulo, li dumtempe restis sub la malnova nomo «Pejsi la bindisto», ĝis kiam venos iam la bona tempo, tiu feliĉa tempo, kiam ĉio aliiĝos, kiel Bebel diras kaj kiel Karlo Marks diras kaj kiel ĉiuj bonaj, saĝaj homoj diras — tiam, ho tiam ĉio estos alia! Sed ĝis la feliĉa tempo iam venos, oni dume devas staradi de tagiĝo ĝis malfrua nokto kaj tranĉadi kartonpaperon kaj gluadi skatoletojn, kestetojn... Kaj Pejsi la bindisto la tutan tagon staras lacpiede kaj tranĉas kartonpaperon kaj gluas skatolojn kaj kantas dumlabore malnovajn kaj novajn, judajn kaj nejudajn kantojn, plej ofte gaje malgajajn kun gaje malgaja melodio.

— Eble vi fine ĉesus pri viaj nejudaj kantoj? Tiel enamiĝi je nejudoj! Depost ni eniĝis la grandan urbon, li fariĝis tuta nejudo, al diablo!...

II.

Ĉiuj tri Abramĉjo, Mojsajĉjo kaj Dvornjo naskiĝis, kreskis, ĉiuj samloke — inter la muro kaj forno; ĉiuj tri vidas antaŭ si ĉiutage la tutsamon: la gajan patron, kiu tranĉas kartonon,

---

(1) En Sovetio oni ĵus solene festis la dekan datrevenon de lia morto.

gluas skatolojn kaj kantas kantojn, kaj la zorgoplenan, sekiĝintan patrinon, kiu kuiras kaj bakas kaj ordigas kaj neniam estas fininta. Ambaŭ ili ĉiam estas laborantoj: la patrino ĉe l' forno, la patro ĉe l' skatoloj. Por kio oni bezonas tiel multe da skatoloj? Kiu bezonas tiel multe da skatoloj? Tiel pensadas la tri belaj kapetoj kaj senpacience atendas, ke ĉe la patro sin jam kolektu multe, multege da skatoloj, kaj ke li prenu ilin ĉiujn sur la kapon kaj en ambaŭ manojn — eble mil skatolojn — kaj eliru kun ili sur la bazaron kaj revenu sen skatoloj, sed kun mono por la patrino kaj kun bulketoj, kringetoj aŭ frandaĵoj por la infanoj... Bona, ho, bona patro ĉe ili, orulo! La patrino ankaŭ estas bona, sed kolerema. Oni ofte ricevas de ŝi pugnobaton, manpuŝon en la flankon, turnoŝiron je la oreloj. Ŝi ne volas, ke la infanoj ludu je «Paĉjo-Panjo», ŝi ne volas, ke Abramĉjo tranĉadu la defalintajn kartonpecetojn, ke Mojsajĉjo ŝtelu gluon de la patro kaj ke Dvornjo baku panon el sablo kun akvo... La patrino volas, ke la infanoj sidu silente, digne. La patrino evidente ne scias, ke junaj kapetoj laboras, ke junaj animoj sin tiras, tiras — kien?... Eksterdomen! Al la lumo! Al la fenestro! Al la fenestro!

III.

Tutsume unu fenestro, unu sola fenestro. Ĉiuj tri kapetoj sin batas pro la fenestro, kaj kion oni vidas tie? Muron. Altan, larĝan, ĝrizan malsekan muron. Ĉiam, eterne ĝi estas malseka. Eĉ somere!,.. Ĉu iafoje ĉi tien venas la suno. Certe iafoje venas la suno. Tio estas ne la suno mem, rebrilo de la suno. Kaj tiam estas festo. Ĉiuj tri kapetoj sin premas al la fenestro, rigardas supren, tute supren kaj vidas longan, mallarĝan, bluan strion, kiel longa blua rubando.

— Ho, vi vidas, infanoj? Tio estas ĉielo!

Tiel diras Abramĉjo. Abramĉjo scias. Abramĉjo iradas ĥeder'on (2). Li lernas jam alfabeton. La ĥedero ĝuste estas jen ne malproksime, la dua ĉambro, tio estas la dua pordo. Ah! Kiajn mirindaĵojn Abramĉjo rakontadas el la ĥedero. Abramĉjo rakontas, ke ili mem vidis, tiel Dio vidigu al li ĉion bonan, el la fenestro mem grandan muron de supre ĝis malsupre. Abramĉjo ĵuras, ke li mem vidis, tiel Dio vidigu al li ĉion bonan, kamentubon, altan tubon, kaj el la tubo eliĝas fumo... Abramĉjo rakontas, ke li mem vidis, tiel Dio vidigu al li ĉion bonan, maŝinon, per kiu oni kudras sen manoj... Abramĉjo rakontas, ke li mcm vidis, tiel Dio vidigu al li ĉion bonan, veturilon, veturantan sen ĉevaloj... Kaj ankoraŭ similajn miraklaĵojn Abramĉjo rakontas el la ĥedero kaj ĵuras, kiel panjo ĵuradas, ke tiel Dio vidigu al li ĉion

(2) Ĥedero — juda religia lernejo.

bonan... Kaj Mojsajĉjo kaj Dvornjo aŭskultas lin kaj ĝemas kaj envias, ke ĉion, ĉion scias Abramĉjo!

Ekzemple Abramĉjo scias, ke arbo kreskas. Vere, li ankoraŭ, same kiel ili, neniam vidis, kiel kreskas arbo. Ne estas arboj sur la strato. Ne estas! Sed li scias — li aŭdis tion en la ĥedero, — ke sur arbo kreskas fruktoj, kaj tial, manĝonte frukton, oni laŭdas la « Kreinton de l'arbofrukto ». Abramĉjo scias — kion ja li ne scias, — ke terpomoj, ekzemple, aŭ kukumoj aŭ bulboj, aŭ ajlo kreskas sur la tero. Kaj tial ni, manĝonte ilin, laŭdas la « Kreinton de l'terfrukto ». Ĉion scias Abramĉjo! Li nur ne scias, kiel kaj kiamaniere ĝi kreskas, ĉar ja li ankoraŭ, same kiel ili, neniam vidis tion, ĉar sur ilia strato malestas kampo, malestas ĝardeno, malestas arboj, malestas herbeto — malestas! malestas! Sur ilia strato estas grandaj muregoj, grizaj muroj, altaj kamentuboj, el kiuj eliĝas fumo, kaj fenestretoj multaj en tiu granda murego, miloj da fenestretoj, kaj maŝinoj, funkciantaj sen manoj, kaj vagonoj veturantaj sen ĉevaloj — kaj nenio plu! nenio!

Eĉ birdeton oni ĉi tie vidas malofte. Aleraras iafoje pasereto, do ĝi estas griza, kiel la griza murego. Bek-bok la grizajn ŝtonojn, ĝi leviĝas kaj forflugas... El manĝobirdoj ili por honoro de sabato vidas kelkfoje kvaronbirdon kun pala etendita piedeto. Kiom da piedetoj havas birdo? — Memkompreneble, kvar! La plej bona pruvo — ĉevalo! Tiel prijuĝas la pli maljuna, Abramĉjo, kaj Abramĉjo scias ja ĉion!... Kelkfoje panjo alportas el la foirejo kapeton de birdo kun clstarantaj okuletoj, surkovritaj per maldika blanka haŭteto... « Ĝi malvivas » — diras la pli maljuna Abramĉjo, kaj ĉiuj tri kapetoj rigardas unu la alian per grandaj nigraj okuloj kaj ĝemas... Naskitaj kaj edukitaj en la granda urbo, en la granda murego, en treega malvasteco, mizero kaj malriĉeco, ĉiuj tri infanoj neniam ankoraŭ havis okazon vidi antaŭ si vivantan birdon, nek beston, nek bruton, krom kato. Katon ili havas propran, vivantan, grandan katon, grizan, kiel la granda, griza malseka murego... La kato estas ilia tuta amuzo. Kun la kato ili ludas horojn longe; vestas al ĝi tukon sur la kapon, nomas ĝin « boparencino » kaj ridas, ridas senfine! Do ekvidas panjo kaj disdividas: donacas al ili — al tiu pugnobaton, al tiu puŝon en la flankon, al tiu ĉi turnoŝiron je l'orelo. La infanoj disiras sur siajn lokojn, post la fornon. La pli maljuna, Abramĉjo rakontas ion kaj la pli malgrandaj, Mojsajĉjo kaj Dvornjo, aŭskultas; ili rigardas sian pli maljunan frateton per grandaj okuloj kaj aŭskultas. Abramĉjo diras, ke panjo estas prava. Abramĉjo diras, ke kun kato malpermesite estas ludi, ĉar kato estas netuŝinda domaĝulo. Ĉion scias Abramcjo, ĉion! Ĉu estas aĵo, kiun Abramĉjo ne scius?

El juda lingvo tradukis ŜIO TRAŬBE.

LA MINKARBO KAJ LA TRITIKO

JEAN JAURÈS (Ĵan Ĵores)

Ĉe la malsupro de la orkoloraj garbamasoj, kiuj atendas la proksiman viziton de l' draŝmaŝino, kamparanoj alportas kelke da blokoj el brila kaj nigra karbo. Ĝi estas la hejtaĵo, kiu morgaŭ funkciigos la maŝinon.

Tiel, per la karbo, per la granda industria forto, nun finiĝas la ciklo de l' tritiko. Jen estas kuniĝo de bildoj kaj fortoj tute nova.

Antaŭ kelke da jaroj, la karbo rememorigis ĉu pri grandaj, sonoraj fervojaj stacioj, ĉu pri vastaj fabrikejoj, tremantaj kaj polvaj. Jen ĝi hodiaŭ, kiu miksas sian subteran, malhelan brilon kun la subĉiela belbrilegeco de l' rikoltoj, kiujn orumis la granda hela spaco. Morgaŭ ĝi igos la maŝinon spiregi en plena kvieta naturo kaj la ombro de ĝia movema fumo pasos super la herbejojn, kie la kresko malrapidas, kie la vivofortoj silente laboradas. En tiun minkarbon amasiĝis depost miloj da jarcentoj, la suna varmeco. Tiel, dum la suno de la nunaj tagoj maturigas la tritikospikojn, estas la suno de l' malproksimaj tagoj, revivigita per la genio de l' homo, kiu helpas la kamparanon por disigi la grenon de l' pajlo.

La homa laboro alvokas al si, kun la viglaj radioj de l' hodiaŭa lumo, la malluman forton de l' iama lumo! Kaj la «noblega gesto de l' semisto», komencanta la ciklon de l' tritiko, kiun la karbo finos, ne nur plilarĝiĝas ĝis la videblaj horizontoj, sed ĝi plie memorigas nun, por la lasta plenumado de l' verko, pri la fortoj radiantaj en la horizontoj de l' pasinto.

Kia glor' atesto pri la pligrandigo de l' homo, pri ĝia kreskanta potenco sur la naturon! Kia glorado al la kreanta intelekto! Kaj kiel iafoje la kamparanoj ektremus de profunda ĝojo se ilian laboron iluminus klara penso! Necesas veki ilian konscion kaj konigi al ili, preskaŭ en la familiareco de

ilia vivo, en la plej kutimaj kaj simplaj agoj, la noblecon de l' homa genio.

Sed ĉu ne estas ankaŭ la homo, kiu kreis la tritikon? La produktoj, kiujn oni nomas naturaj, ne estas plejparte — tiuj almenaŭ, kiujn utiligas la homo — la natura produktado de l' naturo. Nek la tritiko, nek la vinberarbeto ekzistis antaŭ ol kelkaj homoj, la plej grandaj el la nekonataj geniuloj, elektis kaj edukis malrapide kelke da graminacoj aŭ kelke da sovaĝaj vinbertrunketoj. Estas la homo, kiu divenis, en mi ne scias kiu kompatinda grajno, tremanta sub la vento en la herbejoj, la estontan trezoron, kia estas la tritiko. Estas la homo, kiu devigis la sukon de l' tero densigi sian plej delikatan kaj bongustan substancon en la tritikan grajnon aŭ ŝveligi la vinberon.

La forgesemaj homoj komparas hodiaŭ kion ili nomas natura vino kun la artefarita vino, la kreojn de l' naturo kun la kemiaj kombinoj. Ne ekzistas natura vino, malestas natura tritiko. La pano kaj la vino estas produkto de l' homa genio. La naturo mem estas mirinda homa artifiko. Sully-Prud'homme (elp. Sulli-Prüdom) tro taksis la rolon de l' suno en sia belega verso:

Suno, patr' de l' grajnoj, tiuj patr' de l' rasoj!

La nura unuiĝo de l' tero kaj de l' suno ne kapablus naskigi la tritikon. Necesis la interveno de l' homo, de ĝia senripoza penso kaj de ĝia pacienca volo. La antikvuloj tion sciis, kiam ili atribuis al dioj, glora bildo, la eltrovon de l' vinberarbeto kaj de l' tritiko. Sed, depost tiom longe, la kamparanoj vidas, ke rikoltoj sekvas rikoltojn, ke la tritiko eliras el la semo, kiun donas la tritiko, ke la kreado de l' homo tiel bone adaptiĝis al la tero, ĝi tiel larĝe elstariĝas sur la montetoj kaj la ebenoj, ke ili, falintaj en rutinon, konsideras kiel donacon de naturaj fortoj la antikvan ĉefverkon de l' homa genio.

Kaj kiel, efektive, sen ia spiritostreĉo, prezenti al si klare, ke tiu granda tritika maro kiu, depost miloj da jaroj, ondas, kuŝigas, orumite kaj varme dum Junio, por restariĝi verde kaj freŝe, ankoraŭ iom ŝvelite en bril̃ega ora leviĝo, kiel imagi, ke tiu granda maro, kies tajdo estas regulata de l' sezonoj, havas sian malproksiman fonton en la homa intelekto?

Tiele tamen estas, kaj iu esenca parto en la edukado de l' kamparanoj konsistas en la dono al ili de la intensa koncepto de la sento pri tiuj aferoj. Ilia esenca manko estas la troa humileco antaŭ la naturo; ĝi estas la emo konsideri tion, kio estas, sur la socia kampo kiel sur la natura kampo, kiel neŝanĝeblan kaj senkompatan fatalon. Eĉ hodiaŭ, eĉ post

la eksterordinaraj inventoj de l' scienco, eĉ post la aplikado de l' kemio kaj de l' mekaniko al la agrikultura laboro, la progreso, kiam ili akceptas ĝin, ŝajnas al ili nur hazardaĵo, parta kapto. Ili ne havas ideon pri la malrapida, senfina evoluo de l' homa raso. La vivo estas por la kamparano, kiel mallarĝa floso sur senmova oceano. Se li ne tro malsatas, li eĉ ne rigardas al la horizonto. Tamen li komencas moviĝeti. Kaj se ni kapablas per la lernejo, per iu propagando, en kiu ia filozofio pri la mondo kaj la historio donas ĝeneralan percepton, interesi lin fine al la ideo pri evoluo kaj progreso, ni plirapidigos je unu jarcento la starigon de socio pli racia kaj pli justa.

Mi bone scias, ke ĉia parolo estus vana, kaj ĉia teorio senpova, se jam la evoluo ne efikus en la vivo mem kaj en la kutimoj de l' kamparanoj. Necesas, en tio la historia materialismo veras, ke la ekonomiaj kondiĉoj instigu la penson de l' homo. Sed la penso ne estas inerta forto. Ĝi iras, laŭ la direktoj de l' faktoj, pli rapide ol la faktoj mem. Doni al la kamparano la profundan senton pri la universala movado; per la historio estantigi la grandajn ŝanĝojn, jam okazintajn; atentigi lin pri la malrapidaj transformoj, sed senhaltaj, kiuj okazas ĉirkaŭ li; vidigi al li la pligrandiĝantan potencon de l' homo, kiu kreis senĉese novajn formojn de vivo kaj de socio, kaj kvazaŭ kreis la naturon mem en ĝiaj plej necesaj produktoj; komuniki ankaŭ al li la intelektan kuraĝon, kiu igis granda la homaron; ne estas tasko pli urĝa, kaj hodiaŭ ĝi ne superas la fortojn de l' homa intelekto.

La minkarbo kuŝas apud la garbamaso. La scienco estu apud la rikoltlaboristo.

La fajra animo de la industrio eniris la laboron de l'kamparano; la arda penso pri progreso, fajr' animo de l' homa historio, eniru ankaŭ lian cerbon.

Tradukis el la franca E. LANTY.

(10 aŭgusto 1901.)



PRI ENERGIO

Per la vorto « energio » la moderna tekniko nomas la kapablon fari iun laboron. Tiamaniere la frazo « karbo enhavas provizon da energio » signifas, ke bruligante la karbon ni povas igi iun maŝinon plenumi utilan por ni laboron. Kaj neniu laboro estas farebla sen elspezo de energio. Tial, energio estas la plej valora el ĉio, kion disponas homo. Sen ĝi li ne povas preni kaj uzi por siaj celoj eĉ tion, kion donas al li la naturo. Eĉ pur utiligi pomon, maturiĝintan sur pomarbo, necesas fari iun laboron (levi la manon, deŝiri la pomon, enbuŝigi kaj maĉi ĝin) kaj, sekve, elspezi iomon da energio.

Prahomo havis en sia dispono nur tre malgrandajn kaj rapide elĉerpiĝantajn energi-provizojn de sia propra korpo. Post multaj miljaroj homo ellernis utiligi por plenumo de laboro la energion de siaj laborbestoj, deviganta ilin transporti ŝarĝaĵojn aŭ treni post si plugon. Kaj homo de tiu epoko ludis tre mizeran rolon en la vivo de ĉirkaŭanta lin naturo.

Modernaj inĝenieroj scipovas grandegajn energi-provizojn, kaŝitajn en la naturo. La ĉefa fonto, la ĉefa produktanto de tiu ĉi kaŝita en la naturo energio estas nia suno. Ĝi, havante la temperaturon de 6.000 ° sendas en la mondspacon torentojn da energio en formo de lumo kaj varmo. Nur eta parto (1/2.200.000.000) de tiu ĉi energio atingas la terglobon, sed eĉ ĝi ne estas plene akceptata de la tero, ĉar la tera atmosfero ensorbos parton de la suna energio. Tamen eĉ tiu, akceptata de la tero, parto de sunenergio estas grandega por ni : se ni scipovus ĝin plene utiligi, ĝi donus dum jaro 250.000-oble pli multe, ol se ni ricevus bruliginte la tutan terprovizon de karbo.

La ĉefaj teknikaj fontoj de energio en la naturo havas kelkajn formojn: energio de falanta akvo (oni nomos ĝin *blanka karbo*), energio de vento *(blua karbo)* kaj latenta energio de bruligeblaj substancoj. Ĉiujn ĉi energiformojn ni ŝuldas al la suno, ĉar la vento ja okazas pro moviĝo de aertavoloj, kiun okazigas la neegala en diversaj lokoj varmigado de ter-surfaco per suno; kaj ĉar la suno igas la akvon vaporiĝi por denove densiĝi en supraj tavoloj de atmosfero, en formo de akvo fali sur montoj kaj de tie flui al valoj, per sia pezo farante certan laboron. Fine, ĉar ĉiuj bruligeblaj substancoj — karbo, nafto, lignaĵo k.t.p. — devenante el vegetaĵoj, kolektis la saman sunenergion kaj per certaj naturaj procedoj (*), transformis ĝin en la dumlonge konserveblan energi-formon.

Por utiligi la energion de naturo, homo aplikas diversajn maŝinojn. Por inĝeniero maŝino estas instrumento, per kiu li devigas ĉerpatan el naturo energion plenumi iun laboron. Sed maŝino estas necesa ne nur por produktive

(*) Pri tiu temo aperos speciala artikolo en « S.R. ».

utiligi la energion de naturo, sed eĉ por havigi ĝin, por preni la energion el la naturo. Efektive, nur per niaj propraj manoj, sen helpo de maŝino, ni sukcesus havigi al ni tre malmulton karbon el ter-profundaĵoj. Kaj ni aplikas diversajn maŝinojn, komencante de simplaj maŝinoĵ-instrumentoj (fosilo, pioĉo), por elfosi tiun karbon kaj por transporti ĝin al necesa loko. Fine, por plenumi tiun laboron (akirado, elfosado de krudaĵoj, kia estas, ekzemple, la karbo, kaj ilia transporto) ni siavice bezonas elspezi energion, kiun liveras al ni la maŝinoj-movigiloj (vapor-maŝino, nafta aŭ benzina motoro, elektro-motoro k.t.p.). Ni do vidas, ke la moderna tekniko, por akiri provizojn de energio, vaste aplikas maŝinojn plej diversspecajn, per ili venkante la saman naturon, kiu potence regis la prahomon.

Kiom gravan rolon ludas maŝinoj en nia vivo, montras jenaj komparaj ciferoj : oni kalkulis ke dek homoj per plena streĉo de siaj fortoj povas anstataŭi unu ĉevalon, aŭ, pli precize, dek homoj povas doni la potencon de unu ĉevalpovo (HP). Kaj la Tutmonda Energetika Konferenco, okazinta en Londono dum 1924j., kalkulis aliflanke, ke la suma potenco de ĉiuj maŝinoj-movigiloj sur la terglobo atingas 600 milionojn da ĉevalpovoj. Nun komparu : el 1.600 milionoj da tera loĝantaro nur duono estas laborkapabla ; tiuj 800 milionoj povus doni 80 milionojn da ĉevalpovoj, se ili, same kiel la maŝinoj povus labori 16 horojn tage ; laborante nur 8 horojn, la homaro povas doni nur 40 milionojn da ĉevalpovoj, sekve 15-oble malpli multe, ol la nun ekzistantaj sur la terglobo maŝinoj-movigiloj. Se ne ekzistus tiuj ĉi maŝinoj, la homaro povus produkti almenaŭ 15-oble malpli multe da valoraĵoj, ol ĝi produktas nun per helpo de la maŝinoj.

La samaj ciferoj montras plie, kiom gravan rolon ludas la energi-provizoj, sen kiuj la maŝinoj ne estas funkciigeblaj. La moderna industrio kaj trans-porto estas bazitaj sur laboro de maŝinoj-movigiloj ; la lastaj bezonas esti konstante nutrataj per energio ; sekve — kiu posedas energi-provizojn, tiu regas la industrion kaj transporton.

Ĉe la nuna, kapitalisma, sistemo la energi-provizojn posedas ne la homaro entute, sed apartaj landoj, sur kies teritorioj tiuj provizoj troviĝas. De tie ĉi venas la konstantaj interpuŝiĝoj, sekvataj de militoj, inter diversaj landoj, el kiuj ĉiu penas konkiri kiel eble plej multe da energi-provizoj (atentu por ekzemplo la daŭrajn interpuŝiĝojn pro naftaj landregionoj).

Por ke ĉesu tiuj militoj, necese estas ke la energi-provizojn posedu la homaro entute, sed ne la apartaj landoj kaj ne la apartaj kapitalistoj en tiuj landoj. Tion celas la laboruloj, tion celas sennaciuloj. Kaj tial por ĉiu serioza kaj konscia sennaciulo aparte grave estas pristudi bone la problemojn pri energio, ĝiaj fontoj, ĝiaj provizoj kaj ilia distribuo tra la terglobo kaj pri la utiligo de l' energi-provizoj. Ĉar nur armitaj per scio ni povas esperi venkon en nia batalo por atingo de nia idealo (*).

Laŭ la libro de S. Svenĉauski « *Energio kaj ĝia utiligo* » *kompilis* G. DEMIDJUK.

(*) La redakcio disponas por sekvantaj numeroj de « S.R. » serion da artikoletoj. ligitaj kun la problemoj de energio.

 PEDAGOGIO 

Edukada Skemo de la Brita Laborist-Sindikataro (T. U. C.)

Fondo de Laborist-Universitato

MARK STARR

Disaŭdiĝas per radio la publika parolado de Arthur Pugh (Pju) ĉe la ceremonia transdono de Easton Lodge. Pugh estas la nuna Prezidanto de la Konsilantaro de la Brita Laborist-Sindikataro (General Council T. U. C.). Easton Lodge estas granda domo nun donacita de Nobelino Warwick al la Sindikataro por organizo de Laborist-Kolegio. Dum kvarcent jaroj loĝis tie en la domego kun ĝiaj 3.000 akreoj la aristokratuloj, sed nun fondiĝas kolegio, en kiu 200 laborist-studentoj akiros scion. Fotografaĵ- kaj longaj artikoloj aperis en la ĵurnaloj kaj tial necesas klare kompreni la proponitan edukad-skemon en la brita sindikataro.

Historia Resumo. — En la XIX-a jarcento la sindikatoj individue ek-interesiĝis en laborist-edukado. Sed la fruaj planoj de Lovett kaj aliaj Ĉartistoj ne efektiviĝis. La *Institucioj Meĥanistaj*, la Popol-Kolegioj, ktp., estas ĉefe influataj de la mezklasa Kristan-Socialisto. Ofte la studento povas lerni nur pri la teknika afero. La Brita Sindikataro longtempe kontentiĝis je kapitalista edukado kaj agitis por pli bonaj k. pli multenombraj kapitalistaj ortodoksaj ŝtataj lernejoj. Ĉiujare ĝia kongreso akceptis proponojn favorantajn pli altan jaron por forlaso de la lernejo. Parte ĝi subtenas sendistinge edukadon mem kaj parte volis averti la konkurecon de infan-laboro en industrio. Nur la *kvanton*, ne la *kvaliton* de edukado la sindikatanoj volis ŝanĝi. Sed fine aparta movado de laborist-edukado aperis.

Diversaj sindikatoj subtenis Ruskin-Kolegion (Ruskin College) fonditan en jaro 1899 kaj kolektive per sia tiama Parlamenta Komitato la sindikataro reprezentiĝis en la direktantaro de tiu Kolegio. Ĝi ankaŭ helpis la W. E. A. (Laborist-Edukada Asocio, fondita en 1903). Kiam en 1908 komencis la Plebs'a Ligo propagandi sendependecon en laborist-edukado kaj Marksismon, kaj la Laborista Kolegio (Labour College (London), antaŭe Central Labour College) stariĝis en la sekvanta jaro, la sindikatoj de la karbministoj en Sud-Kimrujo (S. W. M. F.) kaj de la fervojistoj speciale helpis. De post tiam aliaj sindikatoj entreprenis la sendependan edukadon. Jen statistiko pri progreso de la

Nacia Konsilantaro de Laboristaj Kolegioj (fondita en 1921 por kunigi la tutlandajn klasojn, kolegiojn kaj la Plebs'an Ligon):

	j. 1923	j. 1924	j. 1925
Sindikatoj kiuj akceptis Edukad-Skemon de la N. C. L. C.	9	22	28
Lokaj kolegioj kaj klas-grupoj	91	139	173
Studantoj en Korespond-Fako.	—	572	1156
Kursoj.	529	698	1048
Studentoj . , ...	11.993	16.909	25.071

Por 1.700.000 anoj en la dudek-ok sindikatoj estas plie aranĝataj specialaj kunvenoj, lekcioj, lernejoj dum semajnfino (Weekend Schools). Du sindikatoj (S. W. M. F. kaj N. U. R.) ankoraŭ subtenas la Laboristan Kolegion.

Aliaj sindikatoj favoras la starpunkton neŭtralan de la W. E. A., sed, ĉefe gvidataj de Pugh kaj G. D. H. Cole kaj maldekstruloj en la W. E. A., tiuj sindikatoj starigis en Okt. 1919 la Laborist- Edukad- Sindikat-Komitaton (W. E. T. U. C.), kiu esperis proponi al sindikatoj la servojn de ambaŭ: de la neŭtrala W. E. A. kaj de la laborista N. C. L. C. Sed la lasta. pro danĝero de fuŝo pri la principo, rifuzis partopreni. En 1920 timetigitaj pro la progreso de sendependa laborist-edukado, la samaj individuoj starigis la Sindikat-Enket-Komitaton kaj pro ĝia laboro la apero de laborist-edukado estis oficiale diskutata en la Kongreso de la T. U. C., kaj la Konsilantaro T. U. C. starigis en 1922 specialan komitaton kiu enhavas reprezentantojn de W. E. A., N. C. L. C., Kooperativa Edukfako (Co-operative Union), Ruskina Kolegio, Laborista Kolegio kaj aliaj malpli gravaj organizaĵoj.

La Kongreso (Cardiff 1921) akceptis la proponon de la Enket-Komitato kaj diskutis la alprenon de la ambaŭ kolegioj. Sed tio estis pli decidebla ol efektivigebla kaj en ĉiu kongreso ĝis Scarborough (1925) la afero nur diskutiĝis. Longe la Enket-Komitato penis unuigi laŭ unu formulo ambaŭ batalantajn organizaĵojn kaj fine, ŝajnas, ĝi trovis ĝin kaj la Kongreso (1925) akceptis. La celo de tiu ĉi akceptita *skemo* estas « edukado por ekipi la laboristojn gajni socian kaj industrian emancipiĝon »; laŭ ĝi la studantoj irantaj Kolegion devas veni tra la sindikataj kaj la lokaj kursoj kaj ĉiu instruisto devas esti sindikatano kaj plene kompreni kaj simpatii la Laboristan Movadon. Ne plu la afero de laborist-edukado dependu de mezklasa helpo kaj mono kaj de la instruisto el kapitalista universitato. Laŭ la *skemo* ĉiu organizaĵo ankoraŭ konservas sian identecon kaj sindikatoj povas havi senpere *skemon* kun la N. C. L. C. kaj la W. E. A., sed la Ĝenerala Konsilantaro (T. U. C.) starigis komitatojn nacian kaj regionajn por kunigi la kom-

pletan funkciadon. Post mallonga tempo la konsilantaro (T. U. C.) esperas mem administri laborist-edukadon. Mankis sufiĉe da mono fari ĝin rapide kaj ĝis nun la Konsilantaro ne povas elspezi ĉiujare pli ol 2.000 funtojn sterlingajn. Ankaŭ depost la Kongreso de Scarborough malfacilaĵoj okazis. Unu grava filio de la W. E. A. ĉe Edinburgo elasociiĝis pro la « tro intima rilato » de la W. E. A. kun la brita sindikataro. Ankaŭ la Ŝtata Edukada Ministraro komencis agiti kaj peti informon ĉu la W. E. A. retorike aŭ serioze parolis pri « edukado por emancipigo ». Ne forgesu, ke pli ol tri kvaronojn da enspezoj al tiu asocio provizas la ŝtato kapitalista, ŝajnas, ke la ĉefuloj de la W. E. A. sukcese kvietigis la suspekton kaj eĉ kelkaj estroj en la sindikatoj volas havi, sub ia kondiĉo, la subvencion de la kapitalista ŝtato. La W. E. A plendas, ke la N. C. L. C. atakas kiel antaŭe ĝian subtenon financan kaj moralan ricevitan de kapitalistoj. La N. C. L. C. respondas, ke la skemo donas al ĝi tiun rajton tiel kritiki. Kunigo ŝajnis pli kaj pli malfacila.

Unue tial la konsilantaro penis unuigi la loĝejajn kolegiojn, sed tie ankaŭ estis obstaklo kaj eble ĝi nun pro la donaco de Nobelino Warwick ignoros ambaŭ kolegiojn (L. C. kaj R. C.) kaj starigos apartan kolegion. Tiel la decido prokrastiĝos, ĉar la principo de sendependeco certe reaperos. La Ŝtato kapitalista ne helpos eduki sian enterigiston kaj sindikataj estroj ne povos kompromisi kun ĝi ĉiam.

En Sovetlando kaj Germanio la palacoj de la riĉuloj konfiskiĝis ; en Britlando unu estas donacita al la laboristaro. La brita sindikataro petas de la unuopaj sindikatoj kaj individuoj monprovizon de 50.000 funtoj sterlingaj por la kolegio organizota. La rezulto de tiu peto decidos. Kelkaj estroj volas nur eduki funkciulojn kaj administrantojn por la sindikatoj ; la aliaj volas seriozan edukon en la socia scienco kaj preparon de instruistoj por disvastigi scion inter la laboristoj. Kredeble G. D. H. Cole fariĝos la estro de la kolegio kaj li certe favoros la *lastan* celon.

Mia opinie, la sperto de la barakto konvinkos plene la britan *sindikataron* pri la neceso de aparta laborista vidpunkto en ekonomio kaj ekonomiaj sciencoj. Jam multaj sindikatanoj akceptis kaj partoprenas en la laboro de la N. C. L. C. kaj uzas la verkojn de la Plebs'a Ligo. La nova kolegio de la sindikataro kaj ĝia edukadskemo tiel devos baziĝi. Mi sendos kiel eble plej baldaŭ raporton pri la temaro, instruplano kaj metodoj alprenotaj. Certe ebla nun estas granda paŝo antaŭen en laborista edukado ; ĝi estu en ĝusta direkto.



Tiel parolas la ciferoj... Provu ni iom deĉifri kaj komenti ilin. Kion ni povas konstati?

Antaŭ ĉio necesas konfesi, ke je 8 paĝoj ni malpli multe laboris nunjare ol en la jaro antaŭa. Malplimultiĝo de la kvanto da verkoj ne estas tamen konsiderebla, ĉar en la nuna jaro ni presigis pli ampleksajn verkojn ol antaŭe. Ankaŭ tre stabila ŝajnas esti la procento da originale verkitaj artikoloj, kiu nur tre malmulte cedas por okupi preskaŭ absolutan duonon de la revuo.

Kreskis la kvanto da lingvoj, el kiuj ni ĉerpis la materialon: aperis tradukaĵoj el rusa, germana, franca, angla, sveda, holanda, dana, estona, litova, juda, pola, armena, tatara, persa, japana kaj avaria lingvoj.

La harmonio inter la diversaj fakoj de nia revuo montras, kiom multan spacon okupas ĉiu el la fakoj rilate al la ceteraj. Ni vidas, ke la belarta prozo kaj la poezio estas precipaj mastroj de nia revuo. Ĝojige kreskis la fako de sciencaj artikoloj, kiu je 62 % konsistas el originalaĵoj (fakto tre rimarkinda!). Bedaŭrinde iom lamas la pedagogia fako, sed tio estas sufiĉe komprenebla.

Jen la konkludoj. Ili estas tre utilaj por kompreni la esencon de nia «Sennacieca Revuo». Ni konsideru ilin en la laboro dum la jaro sekvanta.

LA REDAKCIO.



LIBROJ DE SAT

ELDONA FAKO KOOPERATIVA

	PREZO mk. g.
Faŭsto, Gœthe	1.20
Eklumo en Abismo, H. Barbusse (broŝ.)	0.80
Malgranda Terbiblio (Prolet. Atlaso), Szeréni.	1.80
Proletaria Kantaro (74 kantoj kun muziknotoj).	2.50
Tri Verkoj de Tolstoj	0.80
El la Mondbildo de l' Nova Fiziko, D-ro Reiche.	0.60
La Kemio de la Universo, Prof. Fersman	0.60
Sekspsikologio, S. Ziegler	0.60
La Morto de Blanjo, Jean Tousseul	0.60
Ruĝo kaj Blanko, de L. Jvn	0.60
La Komunista Manifesto (2-a eldono)	0.60
Dokumentoj de Komunismo	1. —
ABC de Sennaciismo, V. Elsudo	0.50
For la Neŭtralismon! E. Lanty (2-a eldono)	0.25
Kontraŭ Dio! Ateista Krestomatieto	0.40
Orienta Blovo	0.40
En Katenoj de la Maljusteco	0.60
Ni Legu! Brunulo. (Internacia Legolibro)	1. —
Petro (kursa lernolibro laŭ parola metodo)	0.70

(La prezoj kompreniĝas inkluzive sendkostoj.)

MALKARAJ LIBROJ

Fundamenta Krestomatio de D-ro Zamenhof	2.75
Fundamento de Esperanto (france, angle, germane, ruse, pole)	1.25
Lingvaj Respondoj (92 paĝoj), sur simpla papero	1.50
Sur luksa papero	2.25
Marta, romano (237 paĝoj)	2. —
La Rabistoj (144 paĝoj)	1.20
Vortaro de Esperanto (esp-o-esp-a) de Kabe	2.50

(La prezoj kompreniĝas inkluzive afranko. La livero de libroj, kiujn peras nia librejo, okazas nur kontraŭ antaŭa pago. Rekomendite ni sendas, se oni aldonas 15 % pli al la pago.)

Krom tio ni liveras ĉiujn esp. librojn de aliaj eldonejoj.



Mendu ĉe Administracio de SAT

Richard Lerchner, Leipzig O 27, Colmstrasse 1

Le Gérant: L. GLODEAU. ★ Esperanto-Presejo J. SOLSONA, 9, rue Hallé, Paris-14e